ESPERANTA VORTO

Oběžník kroužku esperantistů při Újezdní osvětové besedě v Lanškrouně

8

Cirkularo de Esperanto-Rondeto ĉe Distrikta kleroga kunularo en Lanškroun - ČSR

Januaro 1952 / II-a j. /

Ni laboru por mondpaco !

Ni estas Esperantistoj, tial ni devas esti ankaŭ pacdefendantoj. Lingvo Esperanto estis kreita por fratiĝo de nacioj kaj estas komprenebla, ke lingvo mem tuta ne povas atingi celon. Por la fratiĝo, por pace en la mondo, devas labori ni, homoj – Esperantistoj. Manieroj de tia laboro estas diversaj.

Jen! Sekretario de Esperanto Grupo ĉe Kioto Universitato Matsumoto Kiyoshi sendis al ni sciigon, ke ilia Studenta Asocio aranĝis ekspozicion pri atombombo. Li sendis ankaŭ multan materialon, precipe presaĵojn pri tiu temo, eĉ la Esperantajn. En „La Movado“ M. Kiyoshi skribas:

. . . . De eksplodo de la atombombo jam pasis 6 jaroj. Sed eĉ nuntempe oni aŭdas minacvoĉon de venonta milito. La nova milito signifas la atomforto-batalon kaj t.e. pereon de l´ homaro mem. Tiuj, kiuj scias la terurecon de atombombo, neniel kaj neniam aprobos novan militon. Sciigi la terurecon de atombombo al pli multaj homoj signifas plimultigon de l´ voĉo kontraŭ milito . . .

Esperantista Junularo en Opava aranĝis ekspozicion „Porpaca batalo de Esperantistoj“. Ankaŭ tio estas modela ekzemplo por ni. Kiu sekvos gesamideanojn en Opava?

Sur afiŝetoj de Ĉeĥoslovaka Esperantista Junularo estas tiu ĉi teksto:

PACON NI NE ATENDU, POR PACO NI DEVAS BATALI !

Ni batalu ne per glavo, sed per armilo de progreso:

per internacia lingvo E S P E R A N T O !

Ankaŭ ni helpe de nia lingvo devas agi – energie realigi „Internan ideon“, kiu gvidas nin nur al la paco.

## S PRACOVNÍM ÚSILÍM DO 4. ROKU PĚTILETKY

Kara junularo!

Pasis jam duonjaro de la junulara konferenco en Rožnov, kiam „Esperanta Vorto“ fariĝis regiona informilo. Tiam mi opiniis, ke ĝi ne estos eĉ la distrikta, ĉar en orienta Bohemio mi sciis nur pri Junularo Lanškroun kaj eventuale Výprachtice.

Sed nun, post 6 monatoj, mi konstatas, ke situacio en nia regiono estas iom pli favora, ĉar jam 7 kaj baldaŭ 8 rondetoj de junaj geesperantistoj laboros. Sed mi ne estu kontentaj kun nuna stato kaj ni plibonigu agadon de nia rondo – perfektiĝu en lingvo kaj disvastigu la movadon ĉiam kaj ĉie. Vi bezonas subtenon? Do mi proponas al vi:

! Navazujte styk s ostatními skupinami, vyměňujte si zkušenosti i materiál pro vaši činnost! !
! Učte se jedni od druhých ! !
! Nechcete-li ztrácet členy, připravujte schůze s hodnotným programem, ale vždy vzbuzující !
! veselou a přátelskou náladu. Musíte vytvořit nerozborný kolektiv nadšených pracovníků, na !
! kterých se může budovat. !
! !

Antaŭ kelkaj tagoj via grupo ricevis demandaron de s-ano Vl. Vyhlídka el Praha. Plenigitan tuj resendu, por ke li povu fondi precizan kartotekon de Ĉeĥoslovaka Esperantista Junularo.

Eble ke en via ĉirkaŭaĵo ekzistas iu novfondita grupo, pri kiu ni ankoraŭ ne scias. Do transdonu al ĝia delegito kopion de la „Informlisto" kun la peto, ke li kiel eble plej frue forsendu ĝin plenigita al adreso de s-ano Vl. Vyhlídka / Masarykova 33, Čakovice u Prahy /.

!! DELIGITOJ, ĉu vi ĉiuj plenumas vian taskon ??
!! Ne forgesu raporti al regiona peranto! / ĝis la 10-a ĉiumonate / .

Hlášení a všechny zprávy pro „EV" posílejte na: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Informace a dotazy o esperantu žádejte u: Jan Werner
Všichni esperantisté / precipe junaj / ve vých. Gottwaldova 65,
Čechách i jinde, kteří nejste činně zapojeni Lanškroun
do našeho hnutí, hlaste se u . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Listo de junularaj grupo kaj de iliaj delegitoj en regiono de cirkulero „ E s p e r a n t a V o r t o":

DOLNÍ ČERMNÁ – Karel Štěpánek, Dolní Čermná 221, okr. Lanškroun
HRADEC KRÁLOVÉ - Lída Rejthárková, ul. Karla IV. 381, Hradec Králové
CHRUDIM - Zdeněk Nechtl, vyšší prům. škola, Chrudim
LANŠKROUN - Luboš Kretzschmar, Pionýrská 54, Lanškroun
PARDUBICE - Karel Franc, Okrouhlík 811, Pardubice
RYCHNOV nad KNĚŽNOU - Zdena Zemanová, cukrárna S.K.P., Rychnov n/Kn.
VÝPRACHTICE - Dana Blažková, Výprachtice 200, okr. Lanškroun

Založení nových skupin se připravuje v těchto místech:
TŘEBOVICE V ČECHÁCH - František Kaláb, Třebovice v Čechách 2
CHOCEŇ - Luboš Dusil, VHŠ, Choceň
LETOHRAD - Jiří Pávek, Komenského 191, Letohrad

Eldonantoj de junularaj cirkuleroj, ne forgesu sendadi al ĉi tiuj delegitoj vian cirkuleron!

## NE NUR URBOJ VERDIĜAS . . . .

Se ni studas la aferon, ni vidas, ke antaŭ ĉio urboj fariĝis centroj, en kiuj koncentriĝas ĉiuj klopodoj kaj provoj disvastigi lingvon internacian inter kiel eble plej granda amaso da homoj.Kvankam ne ĉiuj urboj sukcesis fondi almenaŭ malnombran rondeton Esperantistan, tamen propagando estis multe pli facila kaj fruktodona ol en niaj kamparaj urbetoj kaj vilaĝoj. Sekve de tio multaj lokoj laboris entusiasme kaj vigle, sed nia kamparo – dormis. Kaj ni devas konfesi, ke ni faris sufiĉe malmulte por veki ĝin kaj konscie lasis ĝin dormi. Kie ni serĉu la kaŭzojn? Unu estas, ke ni estis malriĉaj pri tiuspecaj spertoj. Ĝenerale oni atendis, ke la rezulto estus pli ol duba.

Kun la samaj sentoj estis decidite aranĝi Esperanto-kursojn en Dolní Čermná / eĉ ne 1000 loĝ. /, distrikto Lanškroun. De komenco sorto estis tuta malfavora al ni. Nia varba propagando malsukcesis / kvankam ĝi ne estis nia kulpo / kaj nian interkonatiĝan kunvenon ĉeestis eĉ ne 10 interesuloj. Sed ni ne perdis kuraĝon kaj per persona konvinkigado ni atingis nombros 27. Ni dividis kusanojn laŭaĝe en du partojn / unu kurso por mezlernejo / kaj jam monaton ni diligente lernas laŭ lernolibro de Ing. Krajíc. Speciale estas tre ĝojigita la fakto, ke nun preskaŭ ĉiuj kursanoj regulo vizitadas kurson. Ekzemple la geknaboj vizitantaj mezlernejon estas malgrandaj per sia ago, sed grandaj per sia fervoreco. Jam nun oni povas vidi, ke kelkaj fariĝos tre bonaj Esperantistoj, almenaŭ el vidpunkto lingva.

Kompreneble mi scies, ke estas pli malfacile persisti estontece ol arnĝi kursojn. Sed ni asperas, ke el kursoj eliros kelkaj bonaj Esperantistoj, kiuj fariĝos fundamentaj ŝtonoj de estonta

Esperantista klubo en Dolní Čermná. Tio estus plej bona pruvo, ke en malproksima orient-Bohemio Esperanto-movado disvastiĝas eĉ en kamparo.

HRADEC KRÁLOVÉ

. . . ni kunvenas unfoje dem semajno kaj ni estas ĉiam 4 aŭ 5. La knaboj en internato kunvenas kaj lernas aparte. Bedaŭrinde ili ne havas eblecon ĉiam viziti nian klubejon . . .

CHRUDIM

En Chrudim jam ekzistas E.Rondeto ĉe industria lernejo. Krom tio ni ricevis leteron de unu nova samideanino Věra Zaňková, kiu skribas: . . . Lidi, já mám děsnou radost. Dnes mě navštívil jeden esperantista z Pardubic a navrhl, aby se v Chrudimi něco podnikalo. Věřím, že se nám podaří založit kroužek . . .

LANŠKROUN

Decembro estis lasta monato de aŭtunaj kursoj de Esperanto, kiujn regule vizitadis preskaŭ 40 kursanoj. Kursoj estis finitaj kaj ĉiuj pretigis sin, por ke januaraj ekzamenoj estu sukcesaj.

Unu membro de nia rondeto partoprenis laborkonferencon en Praha la 2-an de decembro.

La 16-an de decembro ni aranĝis solenan kunvenon okaze de naskiĝ-jubileo de D-ro L.L.Zamenhof. Tiun ĉi kunvenon partoprenis ankaŭ s-ano Fran. Svačina en Lanžhot. Li donacis al ni du gramofondiskojn por bonhumoro de nia Junularo.

Unu samideanino pruntedonis al ni interesan gramofonon, versimile el mezepoko, kelkajn diskojn ni ankoraŭ aĉetis kaj sur pargetoj de nia klubejo ni povis danci.

Niaj elmonstraj fenestroj kaj ŝranketo ankaŭ en decembro informis la publikon pri Esperanto kaj ĝia movado, pri grava porpaca laboro de Esperantistoj ktp.

Fine ni ankaŭ preparis laborprogramon por jaro 1952.

Luboš Kretzschnar

- o – O – o -

Nova gazeto

Ĝoje ni ekvidis novan junularan ciklost. Esperanto-bultenon „FRATECO“, kiun eldonas Junularo Třebíč. La 1-an de januaro aperis 1-a numero. Enhavo estas parte ĉeĥlingva kaj parte Esperantlingva. Artikoloj temas pri Esperanto, pri laboro de Junularo Třebíč kaj aliaj temoj. En bulteno estas ankaŭ ludoj, kantoj, anekdotoj, rakontoj, interesaĵoj ktp.

Ni gratulas al Junularo Třebíč kaj deziras multe da sukcesoj en ĝia agado. Estu preta!
Adreso: Esperanto-Junularo, Nádražní 8, Třebíč.

Nova cirkulero

Regionan cirkuleron „Junularo, agu!“ eldonas nun Gottwaldov anstataŭ Opava. Sed samideanoj en Opava komencis eldonadon de cirkulero „Informační list“. En 1-a numero ni legis raporton pri Esperanto-movado en Opava kaj pri agade de tien Junularo en novembro kaj decembro.

---

Edgar Th. Havránek-:

M i s t e r o

pri viktimoj de Tut-Anĥ-Amon.

/ Kun afabla permeso de la aŭtoro tradukis esperantlingven – Jan Molnár. /

Egipta, „Valo de la morto“, apud Luksor fariĝis dum komencaj tagoj novembraj de la j. 1922 scenejo de okazintaĵoj, kiuj koheras kun malkovro de la kripto de faraono Tut-Anĥ-Amon el XVIII-a dinastio (el epoko de la j. 1350 antaŭ Kristo). La plejmulto de gazetoj skribis, ke „fantazio kaj superstiĉo ĉi tie havas liberan agadkampon“. Mi ne volas tiun ĉi frazon nei nek polemiki pri ĝi. Male, mi konvinkiĝis pri ĝia ĝusteco pli ol iu alia. Mistero de Tut-Anĥ-Amonaj viktimoj, de kiuj ekzistas jam granda kaj senĉese kreskanta vico, jam senpere fantomas en la cerboj de la eŭropa homaro kaj kondukas al plej strangaj „konkludoj“ pri „venĝo de postmortaj spiritoj“ kaj similaj aĵoj konkludoj, kiuj nur senbezone ridindigas je nefakulaj klasoj seriozajn kaj gravajn, ekzakte sciencajn esploradojn parapsikajn aŭ metapsikajn. Fanatikaj kredemuloj insiste asertas „supernaturecon“ de ĉi tiuj misteroj, kvankam ilies konkludo estas venkebla jam per la simpla fakto, ke io, kio efektive jam ekzistas, estas jam proprasence natura. Cetere ankoraŭ multaj aliaj „naturaj“ okazintaĝoj restas eĉ por la scienco ankoraŭ misteraj, kiel ekzemple elektreco, magnetismo kaj aliaj fortoj. Mi eĉ nun ne konas ĉiujn fortojn naturajn, kiuj estas vere naturaj. Asertado pri malo estus absurda. Kial do oni ne rajtus paroli en kazo de Tut-Anĥ-Amon pri nekonata, sed cetere tamen tute normala forto natura? Mi estis en la Ĉeĥoslovaka respubliko la unua, kiu tuj post alveno de sciigoj pri morto de Lord Carnarvon, publike paroladis pri la mistero de lia morto samtempe kun sciencaj klarigoj pri ties kaŭzoj. Tiu konkludo estis aprobita de faka forumo de ĉeĥa societo metapsika kiel la plej versimila kaj kiel ne-supernatura. Antaŭ ol mi koncize citos ĝin, mi pritraktu la faktojn de Tut-Anĥ-Amon-aj viktimoj komence de kazo de Lord Carnarvon ĝis la plej nova tempo.

Super la eniro al Tut-Anĥ-Amon-a kripto vidiĝas konata epitafo hieroglifa: „Polviĝu la mano, kiu leviĝas kontraŭ mia bildo. Polviĝu tiu, kiu etendas manon kontraŭ mia nomo. Li gardu sin antaŭ mia patro Amon-malfeliĉo venos rapide“. Do, ĝi signifas malbenon, kiun kvazaŭ elparolis buŝo de balzamita kadavro faraona. Kaj la malfeliĉo fakte venis rapide – kaj ne restis unusola: riĉa angla sportulo, kiu partoprenis je elfosaĵoj, lord Carnarvon, eniris kiel unua en la kripton kaj mortis, pikita de insekto. Amiko de la Lordo, amerika miliardulo George Jay-Gould, scivoleme ankaŭ eniris tien kaj mortis, infektita de pesto. Kaj ankoraŭ tria multmilionulo Wolf Jiel mortis pro scivolemo, kiam li revojaĝis hejmen sur sia propra jaĥto.

Hovard Carter, gvidanto de elfosaĵoj, grave malsaniĝis. Edzino de Carnarvon dum sia vojaĝo per aviadilo al Egiptujo mirige saviĝis de la morto per „hazarda“ katastrofo.

- o – O – o -

<u>Malnova, sed interesa raporto.</u>
En la 9-a h-ro de la 29-a jarkolekto de gazeto Junák
estas jena artikolo pri Esperanto:

MOND-ESTRINO DE SKOLTINOJ REKOMENDAS ESPERANTON

Sinjorino Olava Baden-Powell, mondestrino de skoltinoj, tre rekomendas lernadon de internacia helplingvo Esperanto. Kiel konate, la vivino de la usona prezidento F. D. Roosewelt, sinjorino Eleanor Roosewelt subtenas klopodon, ke UNO enkonduku Esperanton, kiel interkompreniĝinta lingvo inter nacioj. Al tio rimarkis Lady Baden Powell:

„Tio estus granda afero, se sukcesus al sinjorino Roosewelt konsentigi UNO-n, ke ĝi

enkonduku Esperanton en la tuta mondo, kaj ke estu akceptita per ĉiuj lernejoj kaj societoj. Se tio okazos, certe tio estos la plej granda bonfaro por la homaro, por pli facila interkompreniĝo de nacioj."

Fondinto de skolta movado, lordo Robert Baden-Powell men jam klopodis pri tio, ke skoltoj eklernu tiun ĉi lingvon. En lia konata verko „Scouting for boys" jam en eldono en jaro 1910 sur paĝo 234 estas rekomendita instruado de Esperanto por skoltoj, kaj inter libroj, kiujn li aprobis por skolta legado, estis ja ankaŭ libro pri Esperanto de Stead „Esperanto for the Millions" . . .

Stepní vlk.

---

N I K A N T U :
xxxxxxxxxxxxxx

VILAĜA LAGO
Tálinský rybník
-------------------

Lagon vilaĝan jam oni enverŝas,
akvo leviĝas kaj bordojn jam tuŝas,
tuta pleniĝis laget´,
kaj subakviĝis vojet´.

Iru el akvo la vojo denove,
sur ĝi iradis mi tiel multfoje,
voje irante al vi
pensis mi, amo, pri vi.

Emil Dvořák: <u>Organizo de la mondo</u>

Kiel organizigis homoj la mondoj !

Sufiĉas skribi sep vortojn kaj nia letero estos ĝuste enmanigita al ĝusta adresato en Ameriko, en ĝusta loko.

Sed kiom da vortoj oni necesas skribi kaj kiel longe ni devas vane voki, ke la organizita mondo havu tion, kio estas krono kaj kondiĉo de ĝia organizo, komenco kaj fino de alfabeto de homeco
- p a c o .

Trad. J-er.

--------------------------------

J. H. Berglin: / el letero /

. . . Ĉu la mondpaco povos daŭrigi? Ĉu la Esperantistoj povos labori por la mondpaco?

Jene, Esperantistoj en Danio kaj Svedio kunlaboras por ĉi tiu celo. La dan-sveda Esperanto-tago 1951 okazis en la provincio Skanio, la plej suda provincio de Svedlando. Tiu ĉi foje ĝi estis aranĝita kiel bela kaj interesa rondveturo en la plej ĉarmaj regionoj de Skanio. Dimanĉe la 2-an de septembro la sud-svedaj Esperantistoj kolektiĝis matene en haveno de la urbo Malmö por renkonti la danajn gesamideanojn. La danoj aliris per unu ŝipo kaj jen starto per aŭtobusoj por rigardi la ĉarmajn regionojn en interno de la provincio. Estis vere dan-sveda atmosfero. Bonvensaluto de la prezidanto de la Skanio s-ro Turen Edberg, gaja kantado kaj interbabilado pri diversaj temoj, kora invito al Danio 1952, kantado de la himno kaj cetere amika kunestado. Dum fulmotondro la aŭtobuso-karavano finfine veturis hejmen al atendanta ŝipo, kie la Esperantistoj tre kontentaj disiĝis kun Ĝis la revido en la urbo Köge en Danio 1952.


! Cikulero ESPERANTA VORTO aperas laŭbezone - Senpaga. !
! Adreso: Esperanto-Rondeto, Palackého 729, LANŠKROUN, ČSR. !